

Redakta noto

Finiĝas la trijara estrarperiodo 2000/2001/2002 de ISAE. Ni sukcesis, aperigi ekde 2000 (Vol.51) regule 4 kajerojn/jare, do 11 kajerojn ĝis la fino de 2002 (Vol.53) kun entute 590 paĝoj kaj 52 originalaj artikoloj. Al tio aldoniĝas n-ro 180 (SR 1/2000) kun 92 paĝoj kaj 9 originalaj artikoloj (kiun redaktis la antaŭa ISAE-estraro kaj kies enhavaj detaloj jam estas registritaj en la Bibliografio de Scienca Revuo, *Zürich*, 2000) kaj 58 paĝoj de "Faka kromkajero – Aŭtuno 2000" kaj 44 paĝoj de "Faka kromkajero – Printempo 2001" kun fiera nombro de 14 SR-kajeroj kaj entute 784 paĝoj. Mi kore dankas al miaj kunestraranoj por la iliaflanka al mia laboro – por efiki la regulan aperon de nia asocia organo – donita subteno, kies personan valoron la unuopaj estaranoj mem prijuĝu.

Tiu ĉi SR-kajero n-ro 192 (SR 4/2002) enhavas, krom interesveka historia artikolo de nia fidela ISAE-membro *Gerhard Kalkhof* kaj terminologia kontribuo el la plumo de nova ISAE-membro *Constantin Dominte*, enkondukan artikolon pri "La nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" kiu aperis en julio 2002. Jes, nian pli fruan tole binditan "verdand biblion" de 1970 kaj ties postajn laŭ foto-procedo reproduktitajn eldonojn anstataŭas nun brile ruĝbrunkolora glatkovrila libro, al kies akronimo NPIV ni devas alkitimiĝi. ISAE estas feliĉa, havi eĉ du membrojn, kiuj jam faris kritikajn recenzojn pri tiu tre grava eldonaĵo: nia vicprezidanto prof. *Otto Haszpra* kaj nia honora membro d-ro *Josef Kavka*.

Scienca Revuo ĝojas publikigi la kontribuadojn de ambaŭ aŭtoroj. Tiu de *Haszpra* – post enkonduka historia superrigardo pri la evoluo de la Esperantaj difin- aŭ klarigvortaroj – traktas ĝeneralajn kaj kritikajn rimarkojn kun praktikaj konsideroj pri NPIV mem. Por atingi pli vastan legantaron ĝi aperas krom en tiu ĉi Scienca Revuo 4/2002 ankaŭ en la pli beletra "Debrecena Bulteno".

La opinio de d-ro *Kavka* pri NPIV jam aperis en la periodaĵo "Starto", do ankaŭ tio estas atingebla por pli vasta legantaro. Mallonga kontribuo aperas en la sekcio "Terminologia angulo" de tiu ĉi kajero, sed por publikigo de pluaj detalaĵoj li sumigos siajn kritikajn faksciencajn rimarkojn en la venonta SR 1/2003 sub la titolo "Scienca Vortaro de Esperanto (akompane al la nova PIV)".

Ni pensas, ke la opinioj de la du fakuloj povas interesi ne nur sciencistojn, sed pli vastan legantaron, kaj ni esperas, ke ambaŭ kontribuoj vekos emon al pluaj diskutoj, ekz. kadre de nia nova rubriko "Leteroj de legantoj" en Scienca Revuo, al kiu mi invitas niajn fake aŭ lingve interesi-tajn membrojn de ISAE.

(*R. Sachs*, prezidanto de ISAE)

La Nova PIV (2002)

HASZPRA Ottó

Fine ĝi aperis! 25 jarojn post la antaŭa versio (kaj 15 jarojn post ties malgranda Suplemento). La ĝojo estas certe grandega en Esperantio. Enkonduke ni iom trarigardu la **historion de la difinvortaroj** (aŭ: **E-E-vortaroj**) de Esperanto.

Historio de la komencoj ĝis "La Nova PIV" (NPIV)

En la komenco ne ekzistis E-E difinvortaroj. La "difinojn" donis alilingvaj ekvivalentoj de la Esperantaj vortoj. *Zamenhof* aldonis po unu folion titolitan en iu el kvin lingvoj (rusa, germana, franca, angla, pola) -Vortaro Internacia/Nacia (Vortaro por Nacianoj), kun ĉ. 900 Esperantaj radikvortoj kun alilingva traduko, al la respektivaj- (rusa, germana, franca, pola, pli poste angla) eldonoj de la **Unua Libro** titolita

– D-ro Esperanto: **Lingvo internacia - Antaŭparolo kaj kompleta lernolibro**. *Kelter*, Varsovio, 1887.

La sekva etapo estis la

– **Universala Vortaro de la Lingvo internacia "Esperanto"**, Varsovio, 1893, sankciigita enkadre de la libro de *L.L. Zamenhof: Fundamento de Esperanto*, *Kelter*, Varsovio, 1905, konsistanta en la vortara parto el 2600 radikvortoj kaj el ĉies kvinlingvaj tradukoj (franca, angla, germana, rusa, pola). Poste, ĝis hodiaŭ, aperis plejparte dulingvaj Esperanto-vortaroj. Tamen ne pasis kvaronjarcento post la naskiĝo de Esperanto, kaj aperis la unua kaj poste aliaj **pli kaj pli alte evoluintaj difinvortaroj Esperanto-Esperanto**. Jen, la plej gravaj ĝeneralaj (ne fakaj) difinvortaroj de Esperanto estis (kun citaĵoj, se ne alimaniere indikitaj, el la Enciklopedio de Esperanto, Budapeŝto, 1934):

– *Kabe (K. Bein): Vortaro de Esperanto*. Aperis (eble en Varsovio) en 1910 sur 175 paĝoj. Ĝi "celis doni la tute bonajn fidindajn vortojn, kiujn sentime la esperantistoj povas uzi" (*C. Bourlet*). "...la

Esperantajn vortojn li difinas, tre klare, tre trafe, en ia eleganta maniero" (*Kalocsay*).

– *E. Boirac*: **Plena Vortaro Esperanto-Esperanto kaj Esperanto-Franca**. Parizo, 1911. XXII + 430 paĝoj. "Granda repertuaro de ĉiuj Esperantaj radikvortoj, troveblaj ne nur en E-naciaj kaj naciaj-E-vortaroj, sed ankaŭ en la diversaj Vortaroj Teknikaj, kaj eĉ en la verkoj literaturaj, filozofiaj, sciencaj ktp." (*Scienca Gazeto*, 1912). "...entute 10.000 radikoj, el kiuj multaj samsencaj..." (*P. Stojan*, 1929). "Modelo de malfacila uzebleco" (*L.M. Kopar*, 1931). Same en la jaro 1911 *Zamenhof* deklaris, ke "ni ekstreme bezonas Plenan Vortaregon" (Antaŭparolo de PV, SAT, Parizo, 1933). Estas konsiderebla iom tia la kajeroj de

– *E. Wüster*: **Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana**, kies unuaj kvar kajeroj aperis inter 1923 kaj 1929, la aliaj kvar eĉ nun estas atingeblaj nur sur mikrofilmo ĉe la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. La tuta vortaro enhavas ĉ. 60.000 leksikajn unuojn. Ĝi estis "ĝisfunde detala prilaboro de la tuta, precipe de la Zamenhofa lingvouzo ... ĉiaflanka uzo de ĉiu vorto estas klare difinita ... plejparte per ekzemploj, tiel ke oni tute ne devas scii la germanan lingvon por povi tre bone utiligi la vortaron" (*L. M. Kopar*). Ĝi estas multilate nesuperita eĉ en niaj tagoj.

Iniciatita en 1927 de *E. Lanti*, gvidanto kaj unu el la fondintoj de SAT, la unua eldono de la Plena Vortaro, dediĉita servi la bezonojn de ordinara Esperantistoj – do ne kiel la akademi-nivela vortaro de *Wüster* – estis eldonita en 1930:

– *E. Grosjean-Maupin, A. Esselin, S. Grenkamp-Kornfeld, G. Waringhien*: **Plena Vortaro de Esperanto**. SAT, Parizo, 1930. La dua, ampleksigita eldono aperis en 1934, sur 511 paĝoj kun ĉ. 7004 titolvortoj, kiu rapide akiris respekton inter la esperantistaro, kaj kiun sekvis pluraj aliaj eldonoj (fakte represoj). Intertempe *Waringhien* mem kolektis kaj ricevis konsiderindan kvanton da vortoj, parte en formo de novaj fakvortaroj de UEA, de dudeko da fakuloj el la terejoj 1. ĉiutaga vivo, 2. tekniko kaj scienco, 3. neeŭropaj civilizoj kaj 4. beletro, krome la Akademio de Esperanto faris plurajn decidojn pri **Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro**.

Ĉio ĉi estis aldonita suplemente al la kvara eldono (represo de la dua eldono) de PV, do la titolo fariĝis:

– **Plena Vortaro de Esperanto kun Suplemento**, SAT, Parizo, 1953. sur 511 + 63 paĝoj kun preskaŭ 8000 kapvortoj kaj multaj derivaĵoj, kies senŝanĝaj eldonoj (represoj) aperadas ĝis nun. *Lanti*, post la kvara eldono lanĉis la ideon de **ilustrita vortaro**, simila al la franca *Petit Larousse Illustrée*. *Waringhien* daŭrigis sian kolektadon kun pli kaj pli da memvolaj kaj altnivelaj kunlaborantoj. Pro la dua mondmilito la plano multe malfruis. Finfine pli ol tri jardekojn post la lasta ŝanĝita eldono en 1934, povis aperi kun kontribuoj de 60 kunlaborintoj la

– **Plena Ilustrita Vortaro**. SAT, Parizo, 1970, sur XXXVII + 1299 paĝoj kun ĉ. 16.000 kapvortoj kaj sume ĉ. 45.000 leksikaj unuoj. En 1977 la sama vortaro estis denove eldonita kiel dua eldono, sed fakte ofseta represo kun aldono de kvar paĝoj da erarlisto. 10 jarojn poste SAT eldonis, same en la redakto de *Waringhien*, Suplementon kiel apartan kajeron:

– **Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto - SUPLEMENTO**. SAT, Parizo, 1987. Petita en 1990 de la Plenum-komitato de SAT, la entreprenon, tiam ŝajne ne tro grandan, revizii la Plenan Ilustritan Vortaron akceptis univ. docento en *Aix-en-Provence*: *Michel DUC GONINAZ* (MDG). Li fariĝis la ĝenerala gvidanto de la reviziado, krome kunordiganto pri la ĝenerala vortaro kaj pri sciencoj de la socioj. Lia ĉefa kunlaboranto (krome kunordiganto pri matematiko, natursciencoj kaj teĥnikoj kaj organizanto de la komputila traktado de la vortmaterialo) estis esplordirektisto de la Francia Centro pri Scienca Esplorado: *Klaŭdo ROUX* (KR). La nombro de la kunlaborantoj estis ĉ. 180, kies duono zorgis diversajn fakojn. La kunlaboro, kiu pruviĝis enorma, de la du homoj, elstaraj esperantistoj, unu humancienulo, la alia natursciencisto, rezultigis la ĝis nun plej grandan, plej belan kaj plej altnivelan difinvortaron de Esperanto:

– **La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto** (NPIV). SAT, Parizo, 2002, sur 1264 paĝoj kun 16780 kapvortoj kaj sume 46890 leksikaj unuoj.

Eksteraĵoj de NPIV

La Nova PIV (kial ne "reviziita, ampleksigita kaj grave tralaborita eldono de PIV"?) aperis en formato de 14,7 cm x 24,0 cm x 5,8 cm. Laŭ volumeno kaj pezo (pli ol 1,5 kg), ĝi estas verŝajne la ĝis

nun plej granda librovolumo en Esperantio. La koverto estas brile helbruna, la titolo premita per oraj literoj.

La papero estas bonkvalita. La presareo estas 13,0 cm x 21,4 cm, donante lokon por po 52 linioj en du kolumnoj. Ĝi estas relative granda, spaceluzza, kompare kun la malneta paperareo de 14,7 x 24,0. Montras utilan ŝparemon, ke – kompare al PIV kaj PV – super la kap-vortoj ne estas pli granda interspaco. La literoj estas klaraj, bonege legeblaj.

La leksikaj unuoj – kapvortoj kaj iliaj derivaĵoj kaj kunmetoj (presitaj per dikaj literoj, kies alto estas la sama kiel tiu de la aliaj, do kiu ne kreskigas la interlinian spacon) – estas facile, do rapide troveblaj.

La eksteraj flankaj marĝenoj estas po 1 centimetron larĝaj, tiuj ĉe la bindo nur 0,7 centimetron; inverse estus pli taŭge por pli komforta legebleco, ke la leganto ne estu instigita disstrecadi la libron. La marĝeno malsupre estas averaĝe 1,1 centimetra, supre ĉ. 1,3. Ambaŭ povus esti malpli larĝaj (en PIV nur ĉ. 0,6 centimetraj), donante lokon por 4 plusaj linioj sur la presareo (do estus 56 linioj anstataŭ la nunaj 52), kio povintus rezultigi ŝparon de preskaŭ 100 paĝoj.

Ni restu iom ĉe spacŝparado, ja vortaro ne estas amromano, kiun maljunaj sinjorinoj legas daŭre dum horoj per jam maltaŭgaj okulvitroj. Vortaron oni uzas relative malofte por legi nur unu aŭ kelkajn artikolojn. Do la literoj povas esti malgrandaj. Pri la litergrandeco estas karakteriza la nombro de la linioj/centimetro.

Por kompari:
 en la Nova PIV ni trovas 3 liniojn per centimetro,
 en PIV 3,5
 en PV 3,9
 en *RHUD*¹⁾ 4,3
 en *DSI*²⁾ 4,8 liniojn per centimetro.

¹⁾ *RHUD* = *Random House Unabridged Dictionary* (Ne Mallongigita Vortaro de la eldonejo *Random House*): usona difinvortaro en unusola volumo pri 315.000 leksikajn unuoj sur 2214 paĝoj de 23,5cm x 30,3cm. Kun aldonaĵoj la suma paĝnombro estas ĉ. 2600, la volumo estas 9 cm-ojn dika.

²⁾ *DSI* = *Dual Sopena Ilustrado*: hispana difinvortaro de 90.000 kapvortoj plus enciklopedio kun 42.000 kulturtemaj artikoletoj en unu volumo sur 960 riĉe ilustritaj tekstopaĝoj plus 62 koloraj bildo- kaj mapo-paĝoj, kies malneta paĝformato estas 14 cm x 21 cm.

RHUD estas facile legebla, kvankam ĝia dimensio kaj ĝia preskaŭ 6-kilogramo pezo malfaciligas la manipuladojn. Se la paĝoj de la Nova PIV estus malgrandigitaj en proporcio 3:4,3 = 70% (tamen kun ĉebindaj marĝenoj unu centimetraj), ĝi estus same bone legebla, sed duonpeza kaj multe pli facile manipulebla. Fine, estas vera surprizo, ke *DSI* kun preskaŭ la sama paĝformato, kiun havas la vortaroj PIV, *Minnaja* aŭ *Szerdahelyi-Koutny*, malgraŭ la surprize malgrandaj literoj estas perfekte legebla. Do NPIV povus toleri malgrandigon eĉ al 3/4,8 = 62% (tio ankoraŭ ne rezultigus malkreskon de la dikeco).

Mi returniĝos al ĉi tiu demando en la Konkludoj. Min unue surprizis la varia denseco de la dikaj literoj en la diversaj kapvortoj, por kiu mi ne trovis klarigon. Poste mi rimarkis, ke la denseco koncernas tutajn liniojn, nur tio ne estas tiom okulfrapa ĉe la maldikaj literoj.

Fine mi konkludis, ke la marĝen-egaliga programo alĝustigis ne nur la spacojn inter la vortoj, sed ankaŭ inter la literoj. Kontraŭ tio helpus nur, se oni akceptus la opinion de *Zamenhof*, nome, ke la divido de vortoj ne gravas: **oni povas dividi vorton kie ajn** (Lingvaj demandoj, *La Esperantisto*, 1893, p. 32.).

Enhavo de NPIV

Kompreneble, fari sisteman kritikon kaj rimarkaron pri la tuta libro ne estas eble tuj post la apero. Eĉ post multjara regula uzo tio estus malfacila. Do mi mencias aferojn, kiuj sporade en la libro frapis miajn okulojn.

En la nova **Antaŭparolo**, kiun legi estas speciala ĝuo, MDG kaj KR ambaŭ, en tre klara kaj belstila Esperanto, raportas pri la taskoj, la gvidaj ideoj, la cirkonstancoj kaj ankaŭ ekzemploj de sia granda laboro.

Pri ties konkreta enhavo jen kelkaj rimarkoj. Fakte, estas mirakle ke preskaŭ ducent homoj iom aŭ tiom kontribuis al la sukcesa fino. (Mi mem tre ĉagreniĝas, ke mi ne povis partopreni. Fakte, de 1990 ĝis 1996 miaj oficaj taskoj kaj samtempaj familiaj problemoj tiel in-undis min, ke dum ses jaroj mi tenis nenian kontakton kun la E-movado, krom pasivan legadon de du periodaĵoj, kvankam antaŭe mi estis tre aktiva sur la scienca tereno. Poste miaj ŝarĝoj mildiĝis, sed –

pro tro fruaj informoj en la gazetaro – ŝajnis, ke la laboro pri PIV jam atingis finan redaktan/printan stadion, do mi renovigis mian Esperantan agadon en aliaj sciencaj terenoj.)

Mi persone ĝojis, ke inter la vortaroj de modelo "nacia lingvo-Esperanto" la du plej freŝdataj kaj rimarkindaj estis menciitaj kiel fonto: la **Itala-E de Minnaja** kaj la **Hungara-E de Szerdahelyi & Koutny**.

Mi salutas la decidon pri la prefero, ke ankaŭ la **virinaj nomoj**, se esperantigitaj, finiĝu per -o, ja substantivoj. Ne-esperantigita nomo kompreneble povas konservi la originalan formon, eĉ se ĝi finiĝas per -a. Tamen MDG lanĉas ankaŭ la ideon, ke se (adjektivkarakteraj) virinaj nomoj povas esti Roz|a, Lind|a, Perl|a, kiāl ne por viroj Brav|a, Fort|a, Saĝ|a? (Kvankam li ankoraŭ ne metis ilin en la vortaron.)

Pri la **landnomoj** NPIV sekvas la faktan uzadon, do ekz. Koreio el koreo, kion la koreoj tre forte defendis, eĉ se Akademio de Esperanto decidis por Koreo, koreano. (Mi mem cetere opinias, ke la trudo de oficiala(j) sufikso(j) por landnomoj estas ne tro avantaĝa kaj sekvin-da. Surbaze de tio oni povus postuli sufikson por homaj nomoj, ke ni vidu ke temas pri homo, sufikson por nomo de riveroj, ke ni vidu ke temas pri rivero, kiel estas proponoj indiki per sufikso ke temas pri viro ktp.)

Kvankam ankoraŭ daŭras la nekohera uzado de **majuskloj kaj minuskloj** por samkarakteraj vortoj kiel: germana, Nederlanda, sed la gvidanto esprimis sian opinion, ke la ĝenerala minuskligo estas rekomendinda. Internaciaj afiksoj, antaŭe konsideritaj kiel nur sciencaj vortkomencoj aŭ -finoj, tre ĝuste ricevis la kvalifikon de ankaŭ Esperantaj afiksoj: bio-, tele-, -ito k.a., do antaŭ ilia uzo en ĉiutagaj vortoj malfermiĝas la vojo: teleparoli anstataŭ telefoni, vertebrito anstataŭ spondilito k.s. (kvankam ankoraŭ ne en NPIV).

Estas tre bone, ke NPIV nun citas jam ekzemplajn esprimojn el pli ol 50 verkoj kaj aŭtoroj resp. interalie de *Auld*, *Piĉ*, *Rossetti*, *Štimec*, *Waringhien*. Iom strange MDG citas *Vilmos Szilágyi*, kvankam temas pri dulingva verko, kiun verkis hungare la menciita ne-esperantisto, dum la esperantiginto estis *A. Tót*. (La fama esperantista *Szilágyi* estis *Ferenc*, ne *Vilmos*.)

Pri la konservita signado pri **transitiveco** MDG interalie mencias, ke signo "ntr" estas ĉiam deviga, do la verbo ne povas atrakti -n kaj havi -it, -at, -ot (kvankam aŭdacaj esceptoj troviĝas), dum "tr" signifas nur, ke la verbo **povas** havi komplementon signitan per -n, sed ne necese.

El la parto de la Antaŭparolo kunmetita de KR ni ekscias, ke la vortmaterialo de la matematiko, natursciencoj kaj tekniko grave ŝanĝiĝis kaj disvolviĝis kompare kun tiu de la antaŭa eldono. Fakoj plinombriĝis, reorganiziĝis, unuiĝis. Arkaikaĵojn oni elĵetis aŭ modernigis (atompezo iĝis atommaso ktp.) Oni elĵetis tro fakajn kaj neutilajn terminojn, korektis erarajn difinojn, aldonis antaŭe forgesitajn kaj nove aperintajn vortojn, pli ofte uzatajn fakajn terminojn, ne-eŭropajn botanikajn terminojn, fakajn nomojn por distingi de komunuzaj nomoj, novajn sencojn, novajn derivaĵojn kaj pli homogene traktis botanikon kaj zoologion.

Oni preferis **kunmetaĵojn** (nekristala anstataŭ amorfa, sesangulo anstataŭ heksangulo), la uzon de -ilo al tiu de -atoro, komputilo venkis, komputero estas forigita, komputoro restis, kvankam iĝis malofta. Konvene al la disvolviĝo de la scienco, la iamaj **du regnoj de vivuloj** (animala, vegetaĵa) disiĝis en ok regnoj, arigitaj en du, eĉ tri domaniojn. Anstataŭ klasifikaj tabeloj nun kladogenezaĵoj arboj pli klare kaj precize montras la parencecojn inter la grupoj de vivuloj.

Post trarigardo de la ideoj prezentitaj en la Antaŭparolo, nun iom pri la efektive **vortara parto**, en si mem ĉ. 1240 paĝoj. La **ilustraĵoj** de PIV estis parte forlasitaj, parte oni aldonis novajn. Ili estas distribuitaj en la teksto en siajn konvenajn lokojn. Kvante ekz. en la 90-paĝa materialo de la litero A troviĝas 72 figuroj, en la 70-paĝa materialo de la litero T troviĝas 41 figuroj. Do 160 paĝoj kun 113 figuroj.

La tuta nombro de la desegnaĵoj verŝajne ne atingas mil. Tio ankoraŭ estas ne tro multe kompare kun aliaj ilustritaj vortaroj alilingvaj (precipe la menciita *DSI*, kies eksteraj marĝenoj estas plenŝtopitaj de desegnaĵoj, sed bildoj troviĝas ankaŭ insertitaj en la teksto kaj sur apartaj koloraj paĝoj) kaj evidente kun la **Esperanta Bildvortaro** de *R. Eichholz* (kiu bedaŭrinde ne estas menciita inter la fontoj).

Koncerne la tabelon pri la **matematikaj operacioj**, pp. 813-814, estas tre bone ke ĝi estas enmetita, kvankam ĝi devus esti multe pli malgranda, ekz. laŭ p. 1039-1040. Estas tre bone, ke ĝi donas la vorton "per" por la signo de la divido, sed oni devintus forlasi la alternativon "sur". Do nun la prepozicioj por la kvar bazaj operacioj estas: plus, minus, oble, per. Por potencado "alt" estas sprita, sed mia opinie "al" estus sufiĉa kiel ekvivalento de la internacie uzata latina "ad". Al mi mankas el la tabelo la operacioj koneksaj kun kompleksaj, vektoraj kaj eble tensoraj esprimoj. Tiu tabelo estas cetere tre bona, ĉar ĝi donas la elparolon de la unuopaj operacioj.

Malpli bona estas la parenca tabelo **Simboloj** (kie cetere la liter-grandeco estas normala) sur pp. 1039-40, ĉar ĝi donas klarigojn, kiuj foje estas ankaŭ elparoloj, sed ne ĉiam. Estus bone trovi tabelon pri la elementaj funkcioj. La vortaro cetere enhavas ankaŭ esprimojn ne metitajn en la du tabelojn, sed tiuj estas ĉaseblaj nur unuope.

Estas bone, ke **kemiaj esprimoj, botanikaj, zoologiaj sciencaj (latinaj) nomoj** helpas la identigon de la signifo, sed tio mankas ĉe la fizikaj vortoj kaj esprimoj, kie simbolo, formulo kaj unito estus bezonataj. Ekz. impulso ($I = Ft$, N s), movokvanto ($p = m v$, kg m/s), dinamika viskozeco (η , Pa s), kinematika viskozeco (ν , m²/s) k.a. Same ĉe la **esperantigitaj personaj kaj geografiaj nomoj** parenteze oni devus doni la nacilingvan formon aŭ ties oficialan latinliteran version: Hipokrat/o (*Hippokrates*), Pekin/o (*Beijing*), Marsejl/o (*Marseille*), Tetis/o (1. *Thetis*, 2. *Tethys* [ĉi lasta kun plusaj signifoj: mezozoika oceano, el kiu restis la nuna Mediteraneo; unu el la lunoj de Saturno.] *M₂* opinie devus esti du E-vortoj, eble Thetiso kaj Tetiso!) k.a. Bona estus tabelo de la greka alfabeto kun E-aj nomoj. Same tabelo pri la **unitoj de SI**. NPIV prezentas por grandaj nombroj la -iliono-iliardo- sistemon (eŭropa triliono = triiliono), kiu produktas malfeliĉe longajn vortojn, kiuj suferas en la sama malsano kiel simplaj miliono, biliono ktp. – t.e. postulas aldonon "da" antaŭ la kvantoj, krome la eŭropa kaj usona uzoj ne koincidas. Jam de pli ol dudek jaroj estas internacie akceptita la **prefiksa sistemo de SI**, ĉiu lernanto ekkonas ĝin en la mezlernejo: *mega-*, *giga-*, *tera-* ktp. Tiuj prefiksoj senigitaj de la fina "a" povus signi la koncernan nombron: miliono = **meg**, miliardo eŭropa = biliono usona = **gig**, biliono eŭropa = triliono usona = **ter** ktp. Pri "ambaŭ" anstataŭ "ĉiuj du" mi donus la difinon: "ĉiu el la du".

Konkludoj

La Nova PIV estas karakterizata per estetika beleco, enhava boneco, facila legebleco, impona apero. Ĝi certe multe kontribuos al la levo de la lingva nivelo de la Esperantistoj. Tio precipe rilatas al la fakaj aplikoj, sed ankaŭ al la ĉiutaga kaj la beletra lingvaĵo. La redaktintoj kaj kunlaborintoj meritas sincerajn gratulojn.

Tio ne signifas, ke la afero de la Plena Ilustrita Vortaro estas finita. Ne nur tial, ĉar ĉiuj lingvoj, do ankaŭ Esperanto, devas disvolviĝi interefike kun la kultura, scienca kaj ĉiaspeca evoluo kaj disvolviĝo de la homaro. Esperanto mem eĉ en la nunaj cirkonstancoj bezonas pluan modernigon kaj perfektigon. En la reto ĉiutage aperas novaj – kelkaj saĝaj, multaj ne pripensitaj – ideoj pri tio.

Estus bone, se regule, ĉiujare aranĝata sciencnivela konferenco estus dediĉita al la "Aktuala disvolviĝo de la lingvo Esperanto". Tio ne koncernus nur la vortojn, sed kiajn ajn rilatojn de la lingvo kiu bezonas fiksadon aŭ refreŝigon aŭ enkondukon, tamen per inda honoro al la netuŝebleco de la Fundamento, kio tamen ne ekskludas ekspluati la ĝisnune ne malkovritajn aŭ ne komprenitajn eblojn dormantajn en la Fundamento por la pliriĉigo, pliperfektigo, eĉ plisimpligo kaj plivendebleco de la lingvo. Tiuj konferencoj certe kontribuos ankaŭ al la plua evoluigo de la vortmaterialo kaj helpus pli oftan, eble ĉiujardekan pliampleksigon, renovigon de la Plena Ilustrita Vortaro.

Por la demando, ĉu la PIV-oj enhavu fakajn vortojn aŭ ili aperu aparte, mi respondas, ke en la nuna stadio la fakvortoj devus esti inkluditaj en la Plena. PIV tute ne estas granda vortaro kiel tiuj de la grandaj nacioj, do povas akcepti duoblon, eĉ trioblon de sia nuna enhavo kaj tamen resti facile manipulebla.

Sed pri tio ni devas returni nin al la demando de ŝparema eldono. NPIV estas facile legebla (eĉ de 60 centimetra distanco), sed la volumo kaj pezo estas iom tro grandaj, kaj por la plimulto de la Esperantistoj ankaŭ la prezo estas tro alta. NPIV estas tre bona por iom riĉaj homoj, se ili ne tre ofte uzas ĝin. Diligentaj uzantoj (ĉu riĉaj, ĉu malriĉaj, ekz. studentoj, esperantologoj, diversaj fakuloj) bezonas pli malgrandan kaj malpezan volumon, sed malriĉaj nepre ankaŭ pli malmultekostan. Krom la nuna, relative luksa eldono, do, SAT devus pripensi ankaŭ popolan eldonon. Estas du ebloj:

– eldoni kun la samaj, nur fote malgrandigitaj paĝoj. La dikeco de la volumo restas (se la papero ne povas esti pli maldika). Kaze de ĉ. 80%-a malgrandigo, la libro estos pli aŭ malpli samvoluma kiel PIV. Sekve la libro estos similfacile manipulebla kiel PIV;

– se oni povas senfote rekte presi de la komputila disko, estas inde refari la enpaĝigon de NPIV sur samgrandaj folioj kiel PIV, kaj per konvena malgrandigo de la literoj oni povas atingi la dimension de PV! Laŭ la menciita ekzemplo de DSI, kiun mi mem fojfoje kutimas uzi, eĉ literoj kun 62%-a malgrandigo estus bone legeblaj! Sed mi proponas 70%-an malgrandigon kiel ne ekstreman. Studentoj ĉie en la mondo uzas tiaspecajn dense presitajn vortarojn.

Do la **popola NPIV** aliĝu al la triumfmarŝo de la **luksa NPIV**!

Noto:

Jena artikolo, kun iom pliampleksigita teksto kaj dividite en du apartajn artikolojn, samtempe aperas ankaŭ en Debrecena Bulteno, n-roj 132 - 133.

Adreso de la aŭtoro

Prof. emerit. Dr. Ottó HASZPRA
Hír u. 9A. III. Iph. 1/3
HU - 1223 Budapest
 HUNGARIO
 <haot@freemail.hu>

Priaŭtora informo

La aŭtoro estas diplomita konstruingeniero kaj membro de pluraj sciencaj akademioj, verkis plurcent sciencajn studojn, librojn k.a., kaj prelegis en sciencaj institucioj kaj konferencoj.

Ekde 1959 profesoro *Haszpra* laboras ankaŭ por la scienca aplikado de Esperanto, redaktis la Sciencajn Komunikaĵojn kaj la scienca materialon de la Hungar-Esperanta Mezvortaro, kaj estas nun *Professor emeritus* de Budapeŝta Teknika kaj Ekonomika Universitato.

La invado de la Romianoj en Britujo

Gerhard KALKHOF

1. La antikva mondo kaj Britujo

a) La mediteraneaj kulturo kaj ekonomio

Retrorigarde serĉante la lulilon aŭ komencon de sia propra kulturo, la Eŭropanoj sin direktas al la mondo ĉirkaŭ Mediteraneo, la maro inter la kontinentoj Eŭropo, Azio kaj Afriko, kaj precipe al la regiono orienten, la tiel nomata "fruktodona duonluno". Komence de la antikva epoko tie vere evoluis apud grandaj riveroj alte kulturitaj ŝtatoj: Egiptio ĉe Nilo kaj la lando inter la riveroj Eŭfrato kaj Tigriso, Mezopotamio (la nuna Irako); Sumerio, Babilonio kaj Asirio, inventintaj skribadon kiel fundamenton de ĉia ŝtateco kun riĉa kultura vivo kaj scienco.

Sed tiuj ŝtatoj restis nelonge solaj. Sekve de politikaj antagonismoj pro reciproka konkero kaj potenc-strebado novaj popoloj aperis el nebuleca pratempo por profiti el la kulturaj valoroj. La interŝtatajn problemojn plej ofte solvis milito. La kulturo transherediĝis al aliaj eŭropodevenaj popoloj kaj fine disvastiĝis trans la limojn de Mediteraneo pli kaj pli okcidenten.

Multaj popoloj apartenis al la proceso, transformante la egiptajn kaj mezopotamajn ŝtatkulturajn elementojn laŭ siaj bezonoj, kiel ekzemplo kvar el ili kiuj daŭre plialtigis la kulturriĉecon: la Persoj, la Fenicioj, la Grekoj kaj fine la Romianoj. Malgraŭ ĉiuj diversecoj (ĉu pri la koncepto de la ŝtato, ĉu pri ties ekonomia bazo) esence tamen ĉio konsistis el du elementoj: sklaveco kiel ekonomia fundamento (kaj fakte karakterizo dum la tuta antikva epoko) kaj navigado. Tio ebligis la esploron de la Mediteranea regiono, de la oriento ĝis la malproksimokcidenta fino je la Kolonoj de Herkulo. Precipe la Fenicioj kaj Grekoj elstaris per navigadaj entreprenoj. Alie la Romianoj: ili restrikis sin antaŭ ĉio al landokupado, kvankam ili ne povis neglekti la navigadon por establi sian ĉirkaŭmediteranean imperion.